

La Espero

2006:1



Mio, mia filo en traduko de Leif Nordenstorm. Provlegu en tiu ĉi La Espero. --- Mio, min Mio i översättning av Leif Nordenstorm. Provläs i det här numret av La Espero.

La frakseno Igdrasil

ANTIKVA DIA HISTORIO



Alf Henrikson & Edward Lindahl

La frakseno Igdrasil en traduko de Bertil Nilsson. Recenzo venos en la venonta numero de La Espero. --- Asken Yggdrasil i översättning av Bertil Nilsson. Recension i nästa nummer av La Espero.

Mio, mia filo kaj La frakseno Igdrasil: Novaj Esperanto-tradukoj de sveda literaturo

Mio, min Mio och Asken Yggdrasil:
Nya Esperanto-översättningar av svensk litteratur

En 2006 aperos "Mio, mia filo" (svede: Mio, min Mio) de Astrid Lingren, en traduko de Leif Nordenstorm. Jam nun vi povas provlegi la komencon de la unua ĉapitro.

ĈU IU AŬSKULTIS radion pasintjare la dekkvinan de Oktobro? Ĉu iu aŭdis, ke oni demandis pri malaperinta knabo? Tion ĉi ili diris:

La Stokholma polico serĉas 9-jaran Bo Vilhelm Olsson, kiu antaŭhierau vespere je la 18a horo malaperis el sia hejmo, Uplanda strato 13. Bo Vilhelm Olsson havas helajn harojn kaj blujajn okulojn kaj je la malapero estis vestita en bruna pantaloneto, griza ĵerzo kaj ruĝa ĉapo. Mesaĝojn pri la malaperinto oni donu al la ordonportista sekcio de la polico.

Jes, tion ĉi oni diris. Sed oni neniam ricevis iujn mesaĝojn pri Bo Vilhelm Olsson. Li estis for. Neniu eksciis kien li malaperis. Neniu scias tion. Nur mi. Ĉar mi estas Bo Vilhelm Olsson.

Mi dezirus, ke mi povus rakonti ĉion almenaŭ al Benĉjo. Mi kutimis ludi kun Benĉjo. Ankaŭ li loĝas ĉe Uplanda strato. Li efektive nomiĝas Bengt, sed ĉiuj nomas lin Benĉjo. Kaj kompreneble neniu diras Bo Vilhelm Olsson al mi. Ili nur diras Boĉjo.

Ili diris Boĉjo, mi volas diri. Nun, kiam mi malaperis, ili ja nenion povas diri. Nur sinjorino Edla kaj sinjoro Sixten nomis min Bo Vilhelm. Nu, sinjoro Sixten fakte nenion diris. Li preskaŭ neniam parolis kun mi.

Mi estis zorgato ĉe sinjorino Edla kaj sinjoro Sixten. Mi alvenis al ili, kiam mi havis unu jaron. Antaŭe mi

loĝis en orfejo. De tie sinjorino Edla prenis min. Ŝi vere volis knabinon, sed neniu estis havebla. Tial ŝi prenis min. Sed sinjoro Sixten kaj sinjorino Edla ne ŝatas knabojn. Almenaŭ ne kiam ili havas ok-naŭ jarojn. Ili opiniis, ke fariĝis tro da bruoj en la domo, kaj ke mi tro multe malpurigis post kiam mi ludis en la Tegnér-parko kaj ke mi lasis la vestaĵojn dise kaj ke mi parolis kaj ridis tro laŭte. Sinjorino Edla ĉiam diris, ke estis malfeliĉa tago, kiam mi alvenis al la domo. Sinjoro Sixten nenion diris. Jes, iam li diris:

"Ho vi, foriru eksteren, por ke mi ne devu vidi vin."

Mi plej ofte estis ĉe Benĉjo. Lia patro ĉiam parolis multege kun li kaj helpis al li konstrui aviadilajn etmodelojn kaj desegnis signojn sur la kuirrejan pordon por vidi kiel multe kreskis Benĉjo kaj tiel plu. Benĉjo rajtis ridi kaj paroli kaj dise lasi la vestaĵojn tiom, kiom li volis. Lia paĉjo tamen amis lin. Kaj ĉiuj knaboj rajtis veni al la hejmo de Benĉjo por ludi. Al mi neniu rajtis veni, ĉar sinjorino Edla diris, ke tie ĉi ne devas esti tumulto de infanoj. Pri tio samopiniis sinjoro Sixten. "Por ni sufiĉas la knabaĉo, kiun ni jam havas", li diris.

Iam, kiam mi kuŝiĝis en la lito vespere, mi deziradis ke la paĉjo de Benĉjo estu ankaŭ mia paĉjo. Kaj mi scivoladis, kiu estis mia vera paĉjo kaj kial mi ne rajtis esti ĉe li kaj ĉe mia vera panjo anstataŭ en la orfejo kaj ĉe sinjorino Edla kaj ĉe sinjoro Sixten. Sinjorino Edla diris al mi, ke mia pan-

Daŭrigo en p. 7.

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

Februaro 2006 • 94-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00E-post: esperanto@glocalnet.net

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2006: 200 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00E-post: sef@esperanto.seNätsida: www.esperanto.seÖppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider
dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2006:

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*).

Tillägsexemplar kostar 100 kr/år.

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Nätsida: www.esperanto.se/eldonaTelefontid: Samma som Esperanto-Centro Stockholm.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Anita Dagmarsdotter

Manus till *La Espero*

sänds till Leif Nordenstorm

Järnvägsgård 11

961 76 Boden

tel. 0921-123 54


e-post: nordenstorm@glocalnet.net

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5	30 september	31 oktober
Nr 6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

Malte Markheden

Artisto de mil kapabloj



Malte Markheden lernis Esperanton jam en juna aĝo. Baldaŭ li povos festi sian 95-jaran datrevenon. Komence de la pasinta jaro, li tre afable sendis mondonacon al SEF, verŝajne la plej grandan, kiun SEF iam ricevis.

Mi konatiĝis kun Malte antaŭ 30 jaroj, kiam mi renkontis lin en SEF-kongresoj. Poste, kiam mi estis prezidanto de SEF, li ĉiam sendis la kluban gazeton de la klubo en Ljungby. Li estis redaktoro kaj prezidanto.

La katastrofa ŝtormego en Januaro 2005 trafis ankaŭ la loĝlokon de Malte. Dum semajnoj mankis al li elektro kaj telefono. Poste mi kontaktis lin por diskuti pri la donaco kaj pri vizito ĉe li venontsomere por fari intervjuon. Tiam mi demandis lin ankaŭ pri mencio pri li kaj pri la donaco en *La Espero*. Li respondis ke ni rajtas skribi, "sed nur skribu ke estas malgranda donaco".

Vizito en Sjö Haga

Nur fine de Aŭgusto mi havis okazon veturi al Smolando. Dum jaroj mi sciis ke Malte estis aktiva esperantisto. Nun mi eksciis ke Esperanto estas unu inter multaj intereso kaj ŝatokupoj, sed Esperanto ĉiam estis la plej proksima, inter alie pro la kutima korespondado kun eksterlandaj esperantistoj.

Lia loĝloko Sjö Haga situas apud Össjöa lago, ĉe la fino de mallarĝiganta vojo. La loĝdomo kaj la aliaj konstruaĵoj staras tre bele inter altaj kverkoj, betuloj kaj aliaj arboj. Ne similas al kutimaj ĝardenoj, sed aspektas kiel malgranda naturparko. Laŭ la strando troviĝas natura folfoto. Ĝi fariĝis haveneto per helpo de malte Tie li konstruis boatodomon por siaj boatoj.

Li ne nur konstruis la loĝdomon

laŭ propraj planoj kaj ideoj; la du gastodomoj kaj dometoj por ilaroj kaj materialo estis ankaŭ planitaj, desegnitaj kaj konstruitaj por la bezonoj. Komence mi ne vidis la garaĝon, ĉar ĝi estis fosita en deklivo kun pordo verdece farbita kaj pro tio ne facile vedebila.

Inter la multaj intereso fotografado aperis frue. la unuan fotoaparaton li mem muntis per kolektitaj partoj kaj pecoj. En lia arkivo troviĝas ĉ. 48 000 fotoj. Li estis instruisto de elementa lernejo, sed ankaŭ funkciis kiel fotisto kaj estis vokita por foti novgeedzojn, jubileantojn kaj ion alian fotindan.

Malte Markheden lernis ludi orgenon kaj pianon. Li havis talenton kaj faris multajn pentraĵojn, kiujn li vendis.


Li havis grandan intereson por sia regiono, por bienoj kaj homoj. Kiel prezidanto de Torpa Hembygdsförening li verkis libron pri malnovaj bienoj kaj domoj. Li detale esploris pri homoj kiu loĝis tie antaŭ longe. Li faris desegnojn. La libro havas 327 paĝojn. Li verkis ankaŭ liberetojn, inter alie pri la metodo fari kampojn el arbarea tereno per bruligado (*svedjebruk*).

Malte estas poeto kaj verkis poemojn en la sveda kaj en Esperanto. La libro "Rim och Rön" havas 127 paĝojn. Li verkis vortarojn pri arboj/arbustoj kaj pri birdoj, en la sveda, en Esperanto kaj kun latinaj nomoj.

Malte estis ankaŭ jure sperta kaj bone elturniĝis kiam la komunumo venis kun eventualaj rimarkoj pri lia domkonstruo.

Mi ŝatus nomi la fenomenon malte Markheden "artisto de mil kapabloj".

Daŭrigo sur paĝo 3.



Aĉetu ĝin en la favorpreza libroelvendado, aŭ poste pli multekoste ĉe www.esperanto.se/eldona

Estimataj samideanoj!

Neniam estas malfacile pleniĝi numeron de La Espero. Abundas materialo pri tio, kio okazas en la Esperanto-movado. Mi ricevas leterojn kaj retleterojn de esperantistoj. Mi trovas informojn en interreto.

Sur tiu ĉi paĝo tamen estas raporto pri io, kio okazis ekster la movado mem. Temas pri la teatraĵo Nemeza, kiu sursceniĝis en Stokholmo en Decembro.

Esperanto do helpis al la svedoj rekonsciiĝi pri la dramo de Alfred Nobel.

Eble svedoj povus ankaŭ konsciiĝi pri tio ke ekzistas Esperanta kulturo. Unu el miaj planoj estas traduki originalan Esperantan literaturon en la svedan lingvon. Fakte originala Esperanto-literaturo tradukiĝis en dekojn da lingvoj ĝis nun.

Ekzistas multaj eblecoj reklami pri Esperanto.

Via redaktoro

Daurigo de paĝo 3.

bloj”, kaj teorie kaj praktike. Mi diris al Malte ke li estas la modelo de laboremega Smolandano, sed li tion kontraŭdiris, ĉar li naskiĝis en Skanio. la familio venis al Smolando, kiam li estis juna knabo.

Nun Malte loĝas sola. La edzino mortis pasintjare. La tri filoj kaj la filino loĝas dise en suda Svedio. Malte estas tre rimarkinda persono, kaj mi estas tre feliĉa ke mi finfine havis ŝancon viziti lin en lia preskaŭ paradiza naturparko.

La donaco

La “malgranda donaco” multe helpas al SEF dum pluraj jaroj, ĉar SEF devas kreski. Por tio nei devas bone informi kaj aranĝi kursojn por atingi novajn membrojn.

Malte komprenis ke la nuntempaj malaltaj rentoj ne sufiĉas por necesaj agadoj. Fondusoj kiuj kun limigoj, kiuj ne permesas elprenon de la kapitalo, nuntempe ne donas rimedojn por aktiva SEF-agado. SEF ricevis rajton en interkonsento kun Malte, ĉiujare preni monon el la kapitalo.

Koran dankon al malte kiu donacis kun varma koro!

Roland Lindblom

La dramo Nemeza

La dramo Nemeza, kiu nun prezentiĝas en la Intima Teatro de Strindberg en Stokholmo, havis sian plej unuan prezentadon je la 10-a decembro pasintan jaron – 109 jarojn post kiam ĝi estis verkita. Ne estis nura hazardo ke la premiertago koincidis kun la tago de Nobel; la verkisto estas nome Alfred Nobel.

La diino de la venĝo, Nemeza, donis sian nomon al tiu ĉi dramo pri perforto kaj patromurdo. La teatraĵo entenas ankaŭ fortan kritikion de la katolika religio. Alfred Nobel mortis proksimume samtempe kun presigo de la dramo, kaj la pastro Nathan Söderblom decidis kun la postvivantoj de Nobel ke la tuta eldono, krom tri ekzempleroj, estu bruligita, por ke la memoro pri Nobel ne nigriĝu de ĉi tiu teatraĵo.

Ĝis apero de la libro “Kiu amas Alfred Nobel?” de Vilgot Sjöman en 2001, la dramo restis nekonata por la plej multaj. En la libro legeblas eltiraĵo de Nemeza kaj la tradukisto Gunnar Gällmo, tiama estrarano de la Eldona Societo Esperanto, ekscivolemismis legi la teatraĵon kaj sukcesis trovi unu kopion pere de KB. Li poste decidis traduki ĝin al Esperanto kaj la eldono volis ne nur presi la tradukon, sed ankaŭ la originalan tekston en la kontraŭstaraj paĝoj, kio iĝis la unua disvastigita eldono de la libro.

Nemeza estas iuspeca song-teateraĵo, sed la dramo estas bazita sur reala okazaĵo el Romo en 1599. En la protokolo de la koncerna juĝoproceso speguliĝas terura historio pri patro, kiu torturis siajn filojn kaj perfortis sian filinon. En la fino la filino mortigis sian patron kaj kiel puno iĝis senkapigita.

Alfred Nobel, kiu dum siaj mallumaj lastaj jaroj multe skribis, estis fascinata de la rakonto. Percy Bysshe Shelley (kies edzino skribis Frankenstein) jam skribis dramon pri la okazaĵo titoligitan “The Cenci”, laŭ la nomo de la roma familio; kaj Nobel posedis kelkajn ĝiajn ekzemplerojn. La Nemeza estas la versio de Nobel pri tiu okazaĵo. Lia dramo ne traktas la juĝoproceson mem, sed finiĝas per la murdo. La fino de la teatraĵo estas sanga, la murdo de la porkeca patro simboliĝas per batoj sur veran porkapon sur la scenejo.


La teatraĵo entenas pliajn malagrablajn scenojn, kiujn oni provas pligajigi per fari unu el la karakteroj, la serviston Andrea, klaŭneca, sed la ridoj kiujn li elvokas estas preskaŭ “ridoj de paniko” pro la torturo sub kiu vivas la membroj de la familio Cenci.

La teatraĵo estas ironia kaj emfazas la religiokritikajn partojn. La reĝisoro Richard Turpin aktoras kiel la malica patro, sed estas ankaŭ la Satano en la songscenoj. Ankaŭ Madono aperas en la songoj, en la formo de hardita transvestita reĝino.

Tri el la aktoroj estas praktikantoj de teatrouniversitatoj kaj precipe la ĉefrolino Sara Isaksson, kiu ludas la filinon Beatrice estas tre bona kaj ankaŭ ricevis bonajn recenzojn por sia kontribuo.

Anneli Hovberger

La libron Nemesi/Nemeza (dulingva) oni povos aĉeti en la tradicia fabrorpreza libroelvendo (bokrea). Demandu en via librovendejo. ndlr



Richard Turpin kaj Jan Årfström en la dramo Nemeza. Foto: Strindbergs Intima Teater.

Nyårshelg på EsperantoGården

Vi var två personer som hörsammat kallelsen att fira nyår på Esperanto Gården i Värmland tillsammans med Lennart och Barbro Svensson. Det ångrar jag sannerligen inte.

För oss storstadsbor, Anita från Göteborg och jag från Stockholm, var det underbart att få uppleva en vit helg, få vandra på snöiga vägar utan varken sand eller salt och utan störande trafikbuller. Varje dag gjorde vi också ett dagsverke för att rädda rallyhelgen i februari eftersom det är Esperanto Gårdens största inkomstkälla under året. Då är t o m alla extrasängar på vandrarhemmet upptagna. Vi bäddade 44 sängar med nymanglade lakan, dammsög och tvättade golven i 12 rum och korridorerna på övervåningen.

Dessemellan gjorde vi en insats i Lennarts storkök där det ständigt fanns trevliga arbetsuppgifter som

att köra diskmaskinen. Lennart lagade själv all mat så vi kunde gå till matsalen och äta. På nyårsafton bjöd han på en festmåltid.

På nyårsdagen deltog vi i ett fackeltåg för freden, från kyrkan till Saron-församlingen. Efter gudstjänst med mycket sång och musik bjöds vi på kaffe med bullar och kakor samt fick tillfälle att bekanta oss med lokalbefolkningen.

Jag hoppas att vi kommer att bli fler vid nästa nyårsfirande här.

Soile Lingman

Tradukas turisman boŝuron

Esperantistoj en Ludvika tradukas turisman broŝuron pri sia urbo al Esperanto.

Bona ideo ankaŭ por anoj de aliaj urboj!

25 - 28. majo **Sved-dana Esperanto-kongreso**. Malmö. www.agado.net Informoj aperos en La Espero.

3 - 21. junio 37-a Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK), Brattleboro, Vermonto.

25 junio - 22. julio. **Internaciaj Someraj Kursoj de Esperanto** en Lesjöfors. Inf: Esperanto-domo, SE-680 96 Lesjöfors, Svedio. 0590-30909, egarden@esperanto.se (Sampempe seminario por spertaj esperantistoj.)

3 - 7. julio **Esperanto-kursoj** (elementaj kaj progresantaj) Heinävesi, eafsekretario@esperanto.fi

4 - 8. julio **42-a Baltlandaj Esperanto Tagoj** en Kuressaare, Estonio. +372-6035272; esperant@hot.ee

25 - 29 julio **39-a ILEI konferenco** en Parma, Italio.

29. julio - 5. aŭgusto **91-a Universala Kongreso de Esperanto**, en Firenze.

fej@esperanto.it, www.ukflorenco2006.it

29. julio - 5. aŭgusto **37-a Internacia Infana Kongreseto**, IIK 2006 en Prato, Italio. bert.schumann@free.fr

6 - 13. aŭgusto **62-a Internacia Junulara Kongreso** en Sarajevo, Bosnio-Hercegovino. hara@ikso.net

www.eventoj.hu



Al geedziĝo en Serbio per stipendio

Märta Andréasson en Kungälv antaŭ kelkaj jaroj heredigis monon al stipendia fonduso por junaj geesperantistoj, kiuj deziras vojaĝi. Jen rakonto de la ricevinto de la lastjara stipendio.

La 18-an de junio 2005 okazis la geedziĝo de Hokan Lundberg kaj Sonja Petrović en Beogrado, Serbio. Mi feliĉis esti invitita al la festado, kaj por la vojaĝo mi ricevis la Märta-stipendion de 2005. Jen mia stipendia rakonto, kaj samtempe danko al mia plej ŝatata Esperanta familio!

La vojaĝo komenciĝis per rekta flugo el Gotenburgo al Beogrado. Aŭ fakte komenciĝis per plena cirko pri ĉesigitaj flugoj kaj remendado de biletoj, pri kio nun, duonan jaron poste, ni ĉiuj povas rideti. Ĉe la flughaveno la tre spertaj organizantoj Hokan kaj Sonja estis aranĝantaj veturadon de Marta, kiu kaj parolas angle, kaj ne fumas – tre ekskluzivaj trajtoj de taksisto en Serbio. La hotelo situis meze de la urbo, kaj tie finfine mi renkontis de longe ne vidatajn amikojn kiuj venis

de plej diversaj landoj por festi. Al tio ĉi interkultura geedziĝo venis partoprenantoj de Serbio kaj Svedio kompreneble, sed ankaŭ de Britio, Italio, Kroatio, Rusio, Hungario krom aliaj. Mi alvenis du tagojn antaŭ la geedziĝfestado mem, tagoj de plena programo kun gvidata ekskurso, biciklado (kun naĝado por la plej kuraĝaj), komuna restoraciumado, kaj vizito en la hejmo de niaj gastigantoj. Ĉio kompreneble en la plej bona de veteroj. Estis ankaŭ libera tempo dum kio ni butikumis, promenis en la urbo kaj trinkejumis. Mi malkovris du novajn amojn en mia vivo: fraga suko kaj vera glaciaĵo. Nepre ne maltrafu ilin se vi iros Serbien! La geedziĝo okazis en boato, ĝuste kie la riveroj Sava kaj Danubo kunfluas. Bedaŭrinde la vetero ne same brilis kiel antaŭe, sed tiel faris la festeno kaj manĝo! Kiel

mi komprenis la menuo estis kompromiso inter la purvivema paro kaj la serba (kaj sveda) tradicioj ligitaj al geedziĝoj: Estis alkoholaĵoj, sed la manĝo estis vegetara. Tio ĉi estas la plej bona geedziĝo kiun mi iam ĉeestis, precipe ĉar ĉiuj estis invititaj al la postgeedziĝa vojaĝo! Ni okupis mem tri kupeojn en la trajno al Montenegro kaj la nigra maro. Tie ni ĉiuj pasigis belegan tempon kun tre varma akvo kaj vetero por la sezono. Mi lernis kalkuli serbe kaj amuziĝis kun malnovaj kaj novaj amikoj. Kelkaj de foraj landoj, sed aliaj, evidentiĝis, de la sama urbo kiel mi mem! Estis kun malfeliĉo mi tre akurate trafis la buson por komenci la solemnan hejmvoyaĝon al la sveda mezsomero.

Lovisa Gustafsson

Nov-Jorko neformale

Se oni vojaĝas ofte estas bona ideo kontaktiĝi kun la loka Esperanto-klubo antaŭ la vojaĝo. Tion faris la redaktoro de La Espero antaŭ vojaĝo al Nov-Jorko en Januaro.

La rezulto estis ke mi povis partopreni en tre agrabla renkontiĝo kun Nov-Jorkanoj. La Esperanto-Societo de Nov-Jorko havas kaj formalajn kunvenojn, kaj neformalajn kunvenojn en ordinara kafejo, kie oni simple interparolas. Krom tio estas kursoj pri Esperanto. En Nov-Jorko estas ankaŭ la UEA-oficejo por kontaktoj kun UN. Ankaŭ estas projekto verki la historion de la klubo.

Tri al Monda Socia forumo

Kunordigite de UEA, tri afrikaj esperantistoj vojaĝis al Bamako (Mali), por agi tie por Esperanto kadre de la Monda Socia Forumo okazonta de la 19-a ĝis la 23-a de januaro. Ili estas la beninano Francois Hounsounou (TEJO-estrarano) kaj la eurbordano Antoine Kouablan, kiuj ambaŭ membras en la nova Afrika Komisiono de UEA, kaj la togolanda aktivulo Adje Adjevi. Surloke aliĝas al ili la maliano Drissa Flayoro kaj la franco Francisko Simonnet.

Ĉi-jare tiu mondskala evento de la civila socio, sociaj movadoj kaj neregistaraj organizaĵoj, kies celo estas spert-interŝanĝado kaj demokrata

diskutado pri ideoj serĉe de praktikaj

Reta karikaturmuzeo

La 10-an de januaro en Portugalio estis oficiale inaŭgurita esperantlingva versio de reta muzeo pri karikaturoj, kun la iom nepreciza nomo "Virtuala Muzeo de Bildodesegno". La unuan viziton al la esperantlingva versio de la muzeo faris la portugala ministro pri financoj. Esperanto iĝis la tria lingvo de la muzeo, aldone al la portugala kaj angla versioj.

La muzeo de karikaturoj funkcias kadre de la portugala Muzeo pri Gazetaro. La alilingvaj versioj de la muzeo estis oficiale lanĉitaj en novembro 2005, dum malfermo de la 8-a tutmonda karikaturo-festivalo PortoCartoon.

Unu el la sekcioj de la retejo estas Honora Galerio, en kiu oni povas trovi la ĉefajn nomojn de la historio de karikaturo ekde la 19-a jarcento. En aliaj sekcioj de la retejo oni povas trovi informojn pri karikaturoj festivaloj kaj konkursoj tra la mondo, pri aliaj retejoj kaj organizaĵoj rilatantaj al karikaturo kaj kartunoj kaj pri novaĵoj en la mondo de desegnado.

La adreso de la muzeo estas www.cartoonvirtualmuseum.org.

Laŭ Gxangalo

31493 artikoloj en Vikipedio

Vikipedio en Esperanto estas rete konstruata libera enciklopedio, kiu ekzistas en multaj lingvoj. La 20-an de januaro, 2006 la Esperanto-versio konsistis el 31 439 artikoloj.

Ĉiuj – inkluzive de ĉiu leganto – povas redakti ĉiun artikolon, korekti lingvajn erarojn, pligrandigi artikolon, skribeti, aŭ skribegi. La oftaj demandoj klarigas kiel redakti paĝon kaj aliaĵojn. En la paĝo pri lastaj ŝanĝoj videblas tio, kio estas nova. Ĉiu povas kontribui libere, ĉar ĉi tio estas komunuma projekto, ne finita verko, kaj la Vikipedio senĉese ŝanĝiĝas. Se vi satas kunlabori pri certa temo, kontrolu la portalejon, kie estas listitaj ĉiuj temaj portaloj de Vikipedio. Tiuj, kiuj taksas la Vikipedion altkvalita malgraŭ ĝia libera redakto, skribis respondojn al kritikoj.

eo.wikipedia.org



Neformala kunveno de Esperanto-Societo de Nov-Jorko.

208 partoprenis IF

207 partoprenantoj el 25 landoj trovis la vojon al la 22-a Internacia Festivalo (IF) okazinta en Treviro (Trier), la plej malnova urbo de Germanio, de la 27-a de decembro 2005 ĝis la 3-a de januaro 2006. Treviro estis fondita antaŭ pli ol du mil jaroj, kaj en la jaro 180 romianoj konstruis muron ĉirkaŭ la urbo por defendi sin kontraŭ germanoj. La temo de la ĉi-jara IF rilatis al faligo de muroj.

vojaj al pli justa mondo, estas la unuan fojon tricentra, kun Caracas (Venezuelo) kaj Karachi (Pakistano) kiel kromaj okazlojoj, kaj en ĉiuj Esperanto kaj ĝia ĉirkaŭa temaro lingva demokratio kaj lingva ekologio aktive reprezentigigas per atelieroj, informobudoj kaj aliaj agoj.

D-ro Vallienne kaj la unuaj romanoj en Esperanto

ANEKDOTOJ

BONA PRESKRIBO

Verkisto ricevis leteron de leganto, kiu legiĝis: "Mia edzo suferadas pro sendormeco longtempe kaj neniu kuracilo efikas sur li. Hierau mi aĉetis la libron laste verkitan de vi. Ne finleginte eĉ unu paĝo, li endormiĝis. Elkoran dankon. Ĉu vi bonvolus verki pliajn tiajn librojn?"

FIERA KANTISTO

- Ĉu vi ne opinias, ke mi kun mia voĉo povas iri al la opero? - Jes, certe, se vi acxeti la enirbileton.

EVIDENTE

Instruisto: Kion ni devas fari antaŭ ĉio, por ke ni povu ricevi pardonon pro nia peko? Knabo: Antaŭ ĉio ni devas peki.

TURNIĜANTA TERGLOBO

- Paĉjo, kial la terglobo povas turniĝi? - demandis la filo, kiu revenis hejmon post la leciono de geografio. - Kio? La terglobo povas turniĝi? - demandis la patro kun ebria okuloj, - ĝi certe malkaŝe ensucis mian alkoholaĵon. Laŭ "Varma Espero, Pekino"

Lige al miaj studoj pri Interlingvistiko kaj Esperantologio ĉe Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando, mi legis la du unuajn romanojn en Esperanto: "Kastelo de Prelongo" kaj "Ĉu li?", verkitaj de Henri Vallienne en la jaroj 1907 kaj 1908. Jen mallongigo de mia laboraĵo kadre de la temo Esperanta literaturo, 1-a periodo.

Pri la aŭtoro

Oni scias malmulton pri Vallienne. Enciklopedio de Esperanto informas ke li estis kuracisto, naskiĝis la 19-an de novembro 1854 en Saumur, mortis la 1-an de decembro 1908 en Malakoff (apud Parizo). Pri familio troviĝas neniu informo.

Kvankam kuracisto, Vallienne multe interesiĝis pri literaturo; li estis jam publikiginta volumon da poemoj, en la franca, kiam li ekkonis Esperanton en 1903. Li entuziasmiĝis pri la literaturaj latentoj de la lingvo kaj tuj komencis traduki la faman epopeon "Eneido" de Vergilio. La kompleta versio, fervore aplaudata de anonima recenzisto en "La Revuo", aperis en 1906.

En aprilo 1905 lin atakis grava kormalsano kaj post la krizo li ne plu povis forlasi sian ĉambron, eĉ ne sian apogseĝon. Malgraŭ sia kruela sorto, li fervore laboris. Li tradukas verkojn de Prévost, Richet, Musset, Ovidio, verkas propagandan broŝuron (Por kaj kontraŭ Esperanto) kaj filozofian eseon ("Evolucio de la Religia Ideo"), samtempe kunlaborante por aro da gazetoj. Lia agemo, kaj ne la kvalito de liaj verkoj (laŭ Waringhien en Enciklopedio de Esperanto) klarigas, ke li en 1908 atingis la duan lokon (post Kabe) kiel la plej bona esperantista stilisto ĉe konkurso organizita de La Revuo.

Tamen la famo de Vallienne ŝuldiĝas al liaj du romanoj, la unuaj originale verkitaj en esperanto. La unua, "Kastelo de Prelongo", 515-paĝa, aperis en 1907 kaj en 1908 la lasta, "Ĉu li?", kun 447 paĝoj. Apenaŭ ses monatojn poste li mortis, en la aĝo de 54 jaroj.

La romanoj

"Kastelo de Prelongo" rakontas pri nobela familio, kiu perdis ĉion en la franca revolucio kaj ekziliĝis. Ilia tiamma intendanto, Linŝardo, bienpose-

danto kaj estro de antikva familio de bienservistoj, ruze kaj sekrete forrabis ĉion vendeblan el la ruinigita kastelo, kaj tiel riĉiĝis.

Post la falo de Napoleono la markiza familio revenis al Prelongo. Linŝardo reaĉetis la kastelon kaj la parkon, kaj donacis ilin al la rajtaj heredantoj. Rekompence li rehavis sian malnovan oficon de intendanto. Unu el la nepoj de Linŝardo, Viktoro, pere de "protekto" de la markizo, fariĝas oficiro kaj akiras batalgloron en Alĝerio. Tio levas lin el la socia tavolo de vilaĝano ĝis tiu de ĝentilhomo kaj li aŭdacas peti la manon de filino de la markizo. La markizo krude rifuzas kaj la juna kapitano forlasas ĉiujn moralajn skrupulojn por atingi sian celon.

En "Ĉu li?" ludas gravajn rolojn amo, perfido kaj intermikso de homoj. Maziero, kiu studas por fariĝi kuracisto, amas knabinon, kiu tamen edziniĝas al lia plej bona amiko. La juna virino naskas ĝemelojn. Katastrofo okazas, unu el la knabetoj estas mortbruligita en sia lulilo. La patrino pro komplikaj post la akuŝo mortas. Ankaŭ la edzo malsaniĝas kaj mortas.

Maziero akuzas sin mem pri la mortoj, forlasas la kuracistan karieron kaj fariĝas prospera bankiro. Li edukas la knabon Fernando, nomas lin sia baptofilo. Du kuzinoj, Beatrico kaj Regino, konkurencas pri li. Beatrico fariĝas lia edzino kaj Region lia amatino. Pro diversaj kialoj li estas kondamnita al punlaboro en fora insulo, sed sukcesas fuĝi. Regino trovas lin en Svisujo sub la nomo Petro Fradeko kaj edziniĝas al li. Ŝi kaj preskaŭ ĉiuj aliaj, kiuj vidas lin, estas konvinkitaj ke estas Fernando, kiu aperas sub alia nomo, kun paperoj ŝtelitaj de alia viro. Li konstante deklaras ke li estas Petro sed duboj dissemiĝas tra ĉapitroj 6 ĝis 12: Ĉu estas li?

La stilo kaj la lingvaĵo

Diversloke mi trovis komentojn pri la romanoj de Vallienne, ekzemple en libroj de William Auld kaj Vilmos Benzik, kaj en artikoloj de Goncalo Neves kaj Avoto (trovigeblaj en Interreto).

La romanoj apartenas al la tiel nomata leĝera literaturo. Rilate al la stilo de la romanoj miaj fontoj preskaŭ samopinias; la verkoj ne havas artan valoron, la stilo ne estas imitinda, sed ili estas tre gravaj por la historio kaj la

evoluo de La Internacia Lingvo. Benzik eĉ skribas en "Studoj pri la Esperanta Literaturo": "... se Vallienne verkus literature pli valorajn romanojn, li farus malpli grandan servon al nia literaturo." Per tio li volas diri, ke homoj kun nesufiĉa lingvosocio emas elekti simplajn verkojn kun rapide disvolviĝanta rakontfadeno, kiaj estas la romanoj de Vallienne, kaj por la tiamaj esperantistoj Esperanto estis nur fremda lingvo malbone regata.

Mia opinio

Kelkaj aŭtoroj taksas la verkojn de Vallienne kiel preskaŭ nelegeblaj. Tiuj juĝoj estas tro severaj laŭ mia opinio. En nia epoko furoras verkoj de leĝera literaturo kaj televidaj serioj, en kiuj okazas nekredeblaj aferoj kaj rolas tre malprofundaj karakteroj. Verŝajne ankaŭ en la epoko de Vallienne homoj ŝatis kaj bezonis distrajn kaj eks-citajn legaĵojn. Oni devas admiri la aŭtoron pro lia fantazio kaj persisto en la verkado de tiom ampleksaj romanoj. Ili firme tenis mian atenton, kvankam en kelkaj lokoj la monologoj aŭ dialogoj estis tro longaj kaj interrompis la fluon de la rakonto.

La lingvaĵo kelkloke estas iom stranga. En la komenco kelkfoje estis iomete malfacile kompreni la tekston, sed mi rapide alkitimiĝis. Oni devas ja pripensi, ke je tiu tempo (1907-1908) verkanto havis nur tre malgrandan provizon da studmaterialo. Nia tuta literaturo, inkluzive de lernolibroj, vortaroj kaj legolibroj por komencantoj, enhavis proksimume tricent librojn.

Vi povas legi la librojn en elektronika formo ĉe www.omnibus.se/inko kaj formi propran opinionon.

Ann-Louise Åkerlund
Helsingborg

Bedaŭrinde e-librejo provizore ne funkcias. Ĝis la refunkciigo tiuj, kiuj volas legi la menciitajn librojn, povas peti ke Ann-Louise sendos elektronikan ekzempleron al ili per retpoŝto. Skribu al: al_akerlund@yahoo.se

ndlr

Li iras tage kaj nokte

La komenco de la unua ĉapitro el la libro de Astrid Lindgren

Daŭrigo el p. 1.

jo mortis, kiam mi naskiĝis. Ŝi diris, ke neniu scias kiu estas mia paĉjo. "Sed oni ja povas kompreni ke li estis ĉifonulo." Mi malamis sinjorinon Edla, pro tio, kion ŝi diris pri mia patro. Eble estis vere, ke mia patrino mortis, kiam mi naskiĝis, Sed mi scias, ke mia patro ne estis ĉifonulo. Mi de tempo al tempo kuŝis plorante pri li.

Sinjorino Lundin en la fruktovendejo estis bona al mi. Ŝi foje donis al mi bombonojn kaj fruktojn.

Nun mi scivolemas, kiu fakte estas sinjorino Lundin. Ĉar ĉe ŝi ĉio komenciĝis tiun tagon en Oktobro de la pasinta jaro.

Tiun tagon sinjorino Edla diris al mi plurfoje ke estis malfeliĉo ke mi alvenis al la domo. Ĵus antaŭ la sesa vespere ŝi diris al mi ke mi kuru al bakejo en Reĝina strato kaj aĉetu specon de biskotoj, kiun mi ŝatis. Mi surmetis mian ruĝan ĉapon kaj ekiris.

Kiam mi trapasis la fruktovendejon, sinjorino Lundin staris ĉe la pordego. Ŝi tuŝis min sub la mentono kaj strangege rigardadis min. Poste ŝi diris:

"Ĉu vi volas pomon?"

"Jes, dankon", mi diris. Kaj ŝi donis al mi belan ruĝan pomon, kiu aspektis bongusta. Poste ŝi diris:

"Ĉu vi povas enkestigi poŝtkarton por mi?"

"Jes, tion mi ja povas fari", mi diris. Tiam ŝi skribis kelkajn liniojn sur karton kaj transdonis ĝin al mi.

"Adiaŭ, Bo Vilhelm Olsson", diris sinjorino Lundin. "Adiaŭ, adiaŭ, Bo Vilhelm Olsson."

Sonis strangege. Ŝi kutimis diri neion alian ol Boĉjo.

Mi kuris al la poŝtkesto je unu kvartalo for. Precize kiam mi volis enkestigi la karton, mi ekvidis ke ĝi lumas kaj brilas kiel fajro. Jes, la literoj, kiujn skribis sinjorino Lundin, lumis per fajra skribo. Mi ne povis ne legi ĝin. Tio ĉi estis skribita sur la karto:

Al la Reĝo,
la Lando Fora.

Tiu kiun vi longe serĉadis estas survoje. Li iras tage kaj nokte, kaj li portas en sia mano la signon, la oran pomon.

Mi komprenis eĉ ne unu vorton. Sed mi ege malvarmis je la tuta korpo. Mi rapidis por enkestigi la karton.

Kiu iras tage kaj nokte? Kaj kiu portas en sia mano oran pomon?

Tiam mi ekrigardis la pomon, kiun mi ricevis de sinjorino Lundin. Kaj la pomo estis ora. Ĝi estis ora, mi diras. En mia mano mi havis oran pomon. Tiam mi preskaŭ esploris. Ne vere, sed preskaŭ. Mi sentis min ege sola. Mi iris kaj sidigis sur benko en la Tegnér-parko. Tie estis eĉ ne unu homo.

Ĉiuj jam iris hejmen por vespermanĝi. Estis mallumete en la parko kaj iom pluvis. Sed en la ĉirkaŭantaj domoj ĉie lumis. Mi povis vidi, ke lumas ankaŭ en la fenestro de Benĉjo. Nun li sidis tie endome manĝante pizosupon kaj krespetojn kune kun siaj paĉjo kaj panjo. Mi ekpensis ke ĉie, kie lumas, sidas infanoj kun siaj paĉjoj kaj panjoj. Nur mi sidis tie ĉi en la mallumo. Sola. Sola kun ora pomo. Kaj mi ne scias kion fari per ĝi.

Mi zorgeme metis ĝin sur la benkon apud mi, dum mi pensis. Stratlampe staris apude, kaj ĝi lumigis min kaj la pomon. Sed ĝi lumigis ankaŭ ion alian, kuŝantan sur la tero. Estis ordinara bierbotelo, kompreneble malplena. Iu metis lignopecon en ĝian kolon. Verŝajne iu el la infanetoj, kiuj kutimis ludi en la Tegnér-parko antaŭtagmeze. Mi prenis la botelon kaj iom legis sur la etikedo. "Akcia kompanio Stokholmaj bierfarejoj Klaso II" estis skribita. Kaj tiam, ĝuste kiam mi sidas tie ĉi legante, mi ekvidas, ke io moviĝas en la botelo.

En Mil kaj unu noktoj, kiujn mi iam prunteprenis en la urba biblioteko, oni rakontas pri spirito, kiu estis enfermita en botelo. Sed tio okazis fore en Arabio kaj antaŭ miloj da jaroj kaj tio ja ne estis en ordinara bierbotelo.

Verŝajne nur malofte spiritoj kutimas esti en la bierboteloj de Stokholmaj bierfarejoj. Sed tie ĉi tamen estis spirito. Estis spirito – kredu min – kiu sidis en la botelo. Sed videblis, ke li volas liberiĝi. Li fingromontris al la ligna ŝtopilo, kiu ŝtopis la botelkolon, kaj persvade rigardis min. Mi ja ne havis rutinon pri spiritoj, kaj tial mi preskaŭ timis forigi la lignan ŝtopilon. Sed fine mi faris tion, kaj kun granda muĝo la spirito eliris el la botelo kaj komencis kreski tiel multe, ke li fine estis pli alta ol ĉiuj domoj ĉirkaŭ la Tegnér-parko. Tion faras spiritoj, ili povas kuntiriĝi kaj fariĝi tiel malgrandaj ke botelo povas enteni ilin, kaj en la venonta momento ili povas elkreski kaj fariĝi grandaj kiel domoj. Neniu povas imagi, kiel mi timis. Tre-

mis mia tuta korpo. La spirito parolis al mi. Lia voĉo estis kiel granda muĝo, kaj mi pensis, ke tion ĉi devus aŭdi sinjorino Edla kaj sinjoro Sixten, kiuj ĉiam opinias, ke oni parolas tro laŭte. "Ho infano", la spirito diris al mi, "vi savis min el mia malliberejo. Mem diru kiel mi povos rekompenci vin."

Sed mi ne volis rekompencon pro la forigo de la malgranda ligna ŝtopilo. La spirito rakontis ke li alvenis al Stokholmo la pasintan vesperon, kaj li rampis en la botelon por dormi. Ĉar boteloj estas la plej bonaj dormejoj, kiujn konas spiritoj. Kaj kiam li dormis, iu fermis lian elirejon. Kaj se mi ne savus lin, li eble devus resti en la botelo dum mil jaroj, ĝis kiam la ligna ŝtopilo estus putrinta.

"Kaj tio ne plaĉas al mia sinjoro la reĝo, diris la spirito por si mem."

Tiam mi kuraĝigis min kaj demandis:

"Ho spirito, de kie vi venas?"

Estis tute silente dum tempeto. Sed poste la spirito diris:

"Mi venas de la Lando Fora."

Li diris tion tiel laŭte ke la vortoj tondris kaj muĝis en mia kapo, kaj io en lia voĉo igis min sopiri al tiu lando. Mi sentis, ke mi devas veni tien por povi plu vivi. Kaj mi levis miajn brakojn al la spirito kaj kriis:

"Kunportu min! Ho, kunportu min al la Lando Fora! Tie iu atendas min." La spirito skuis la kapon. Sed tiam mi etendis la orpomon al li, kaj la spirito laŭte ekkris:

"Vi portas la signon en via mano! Vi estas tiu, kiun mi devas venigi. Vi estas tiu, kiun la reĝo longe serĉis."

Li kliniĝis kaj levis min al sia sino, kaj muĝis kaj tondris, kiam ni leviĝis tra la spaco. Ni lasis la Tegnér-parkon malproksime sub ni, la malluman Tegnér-parkon kaj ĉiujn domojn, kie lumis en la fenestroj kaj kie infanoj verspermanĝadis kun siaj paĉjoj kaj panjoj. Dum mi, Bo Vilhelm Olsson, ŝvebis supre sub la steloj.

Ni estis alte super la nuboj, kaj ni flugis pli rapide ol la fulmo kaj pli granda muĝo ol la tondro. Steloj kaj lunoj kaj sunoj fajreris ĉirkaŭ ni. Iam ĉio estis nigra kiel la nokto, iam tiel brile luma kaj blanka, ke mi devis fermi la okulojn.

"Li iras tage kaj nokte", mi flustris por mi mem. Tio estis skribita sur la karto.

Publikigita kun permeso
Originala titolo: Mio, min Mio. Origina eldonejo: Rabén & Sjögren Bokförlag AB, Stockholm, Svedio.
© Saltkråkan AB/Astrid Lindgren 1954.
www.astridlindgren.se
Ĉiujn eksterlandajn rajtojn prizorgas: Saltkråkan AB, Box 10022, SE-181 10 Lidingö, Svedio.
Kovrilo kaj ilustraĵoj: Ilon Wikland.
© Traduko al Esperanto: Leif Nordenstorm

LIBROSERVOJ

Librojn oni povas mendii ekzemple per la retpaĝo www.uea.org Klaku je "Katalogo".


Librojn eldonitajn de la sveda Eldona Societo Esperanto oni mendas per la retpaĝo www.esperanto.se/eldona

Tie vi trovas ekzemple la tute novan libron "La Frakseno Igrdrasil". Recenzo venos en La Espero.



Tragedia komedio

August Strindberg. Insulanoj de Hemsö. Romano. El la sveda tradukis Sten Johansson. 177 p. Mondial. New York, 2005.



August Strindberg estis unu el la plej konataj svedaj verkistoj kaj lia romano "Hemsöborna" eble lia plej fama romano, almenaŭ kvarfoje filmigita. Ĝi estas samtempe komedio kaj tragedio, ĉar Strindberg prezentas personojn kun iliaj malfortajoj en fidinda maniero. La malfortajoj tamen kondukas al multaj tragediaĵoj. En la centro estas Carlsson, "eta kompakta Vermlandano", kiu ekservas ĉe la vidvino Flod, sur Hemsö, por plibonigi la terkulturadon, dum la filo Gusten ĉefe interesiĝas pri ĉasado. Post iom da tempo Carlsson kaj la vidvino geedziĝas, sed la rakonto ne finiĝas per tio. Ludas gravajn rolojn la komikaj pastro kaj germana profesoro kaj aliaj. La kerno de la romano estas rilatoj – amaj, amikaj kaj aliaj – inter homoj malsamklasaj, temo, kiun konis Strindberg el sia privata vivo. La rakonton mem mi ne plu recenzos, ĉar tion faris multaj literaturhistoriistoj. Mia tasko estas recenzi la tradukon de Sten Johansson. (Parenteze mi povas rakonti ke dum la 1980-aj jaroj mi estis membro de la Esperanto-Societo de Upsalo. Ĝia tiama prezidanto Yngve Nilsson tradukis la saman libron en Esperanton. Li donis al ĝi la nomon *La Insulanoj*. Dum la klubaj kunvenoj li ofte petis de la ceteraj membroj konsilojn pri la tradukado de diversaj esprimoj. Tio estis tre interesa por ni membroj, kaj donis al ni plurajn eblecojn pripensi ke oni fakte ne traduku al lingvaĵo tro proksima al la originalo. La traduko de Yngve Nilsson verŝajne perdiĝis post lia morto.)

Mi tuj povas konkludi ke Johansson sukcesis traduki la libron en bonan Esperanton. Li evitis tradukojn tro similajn al la sveda. Jam en la unua paĝo ni trovas ke "spelfågel" fariĝis *petolulo* (ne *ludbirdo*); "högånäskrus" iĝis *ceramika kruĉo* (ne *Höganäs-kruĉo*) kaj "gräsälva" iĝis *hidrarga unĝvento* (ne *griza unĝvento*). Traduko pli proksima al la sveda originalo, estus traduko en malpli bonan Esperanton. La tradukinto ankaŭ lerte anstataŭigis svedajn dialektajn esprimojn aŭ misdiritajn vortojn per svedakcenta Esperanto, ekz.: *certe, komenci, kvazaŭ iĝis serte, komensi, kvasaŭ*. Li limigis tiun ĉi metodon al kelkaj vortoj por ne trolacigi la esperantistajn legantojn. Same Johansson imitis germanan esperantoakcenton, kiam parolas germana profesoro germanakcentan svedan lingvon.

La sola dubinda traduko, kiun mi trovis, estas ke la vorto "kammare" tradukiĝis per *kamero*. Ne helpas ke la tradukinto klarigis ke ĝi ne signifas *senfenestra ejo* laŭ la PIV-a signifo. Kial do ne serĉi alian tradukon, ekz.: *ĉambro, (subtegmenta) ĉambreto, dormoĉambro, ĉelo, mansardo*.

Interese estas ankaŭ kompari la tradukon kun tiu de Elisabet Ohlsson en Sveda antologio, vol 1.

La traduko estas bonega. Ĝi havas la saman stilon kiel la originalo. Mi same multe ridetas pri la traduko kiel pri la originalo. Mi forte rekomendas la libron kaj al svedoj kaj al nesvedoj. Interesa fenomeno estas ke tradukojn el nacia lingvo en Esperanton, ofte legas pli multe da homoj el la lando, el kies literaturo venas la libro, ol alilandanoj. Eble ĉar ili volas ĝui la libron, kiun ili jam legis, en alia formo. Tamen estus ege bedaŭrinde se ĉefe svedoj legus tiun ĉi tradukon. Tial, aĉetu ĝin, legu ĝin kaj poste donacu vian ekzempleron al alilanda amiko.


Leif Nordenstorm

Familia dramo

Trevor Steele. La fotoalbumo. Unua volumo. 366 p. Internacia Esperanto-Muzeo. Vieno, 2001.

Mi iom hezitas antaŭ ol legi dikan romanon en Esperanto. La lingvo ne estas mia gepatra lingvo. Pro tio dika romano havas altan sojlon, mi scias ke mi devas iom peni por tralegi ĝin. Ĉi-foje la peno tamen estis malgranda. La kialoj estas du. Unue "La fotoalbumo" estas verkita en fundamenta Esperanto, sen lingvaj eksperimen-

toj. Tio estas ege laŭdinda, ĉar multaj eksperimentlingvaj neologismoplenaj libroj restas nelegitaj sur la librobretoj de seniluziigitaj esperantistoj. Due la libro estas tiel bona, la intrigo tiel suspensa, ke mi simple ne povis lasi la libron sed devis tralegi ĝin nur dum tri tagoj. La temo estas la vivo de Aŭstralia Kvinlanda familio O'Shea, en kiu la patrino reprezentas konserveman katolikismon, kaj la patro – laŭ lia propra diro – kontraŭas stultaĵojn kaj pastrojn en virinaj vestaĵoj. Ambaŭ gepatroj kompreneble influas la sep gefilojn, kiuj tamen finfine devas elektis siajn proprajn vojojn, tamen nur post hezita ŝanceliĝado. La finon oni tamen ne trovas en tiu ĉi libro, ĉar ĝi estas nur la unua el pluraj libroj de serio. Jam aperis la dua. Finfine verŝajne temos pri la plej giganta romana verko iam aperinta en Esperanto. La celo de la verko ŝajnas esti priskribi la historion de familio, kaj ĝi ankaŭ sukcesas tion fari en neordinara maniero. Ĉiu ĉapitro komencas per priskribo de foto, kiun la sekvanta teksto pluevoluas. Malofta kaj interesa metodo.



Aparte plaĉas al mi la priskribo pri la adoleska pensmaniero de la gefiloj O'Shea, periodo dum la homa vivo kiam malsamaj idealoj kaj revoj pri estonta geedziĝo aŭ fratuleco alternas. La tempo de la romano estas 1939-1965, periodo de dua mondmilito kaj malvarma milito, kio donas al la herooj multajn temojn por diskuti. Menciindas nur tre malmultaj evitin-daj vortelektoj. *Moslemo* devus esti *islamano, muzulmano* aŭ eventuale *muslimo*. La aŭtoro tute nenecese prenis la vorton *pinka* el la angla por la koloro, kies nomo estas *roz(kolora)*.

Mi volas gratuli kaj al Trevor Steele, kiu aldonis dikan libron al la esperanta literaturo kaj al la esperantistoj, kiuj ricevis nepre legintan libron.

Leif Nordenstorm